La 20an de decembro 2016

Osprey falis en Okinavo

Osprey (foto) estas origine nomo de rabobirdo, sed nun ĝia nomo estas pli bone konata kiel speciala usona milita aviadilo.

Osprey havas specialan kapablon vertikale ekflugi kiel helikoptero kaj poste flugi rapidege kaj longe kiel ordinara aviadilo. Tamen estas malfacile manipuli tiujn du sistemojn kaj tiel ofte okazis akcidento, ke oni moke diras, ke ĝi estas

produktanto de vidvino. En la sudan insulon Okinavo en Japanio la usona armeo enkondukis tiujn aviadilojn kaj ĉiutage trejnas sin. Do multaj homoj timis/as eventualajn akcidentojn.

Vespere la 13an de decembro usona MV22 *Osprey* falis sur la marbordon de la urbo Nago, Okinavo (foto). Estas domoj 600 metrojn fore, do sekundojn poste ĝi estus trafinta ilin. La pilotoj eskapis el la falanta aviadilo kaj estis savitaj. Kontraŭ la protesto de la gubernio Okinavo la komandanto Nicolson fiere diris: “La pilotoj lerte stiris la aviadilon por ke ĝi ne falu sur tiujn domojn. Ili estas herooj. Iliaj agoj estas dankindaj, do ili devus esti honorigitaj”. La japana registaro esprimis tiun kraŝon kiel “krizokaza alteriĝo” por ŝajnigi la akcidenton ne grava, sed fakte ĝi rompiĝis en pecojn kaj tute ne plu uzeblas.

Laŭ la klarigo de Usono la akcidento okazis, dum oni provizis ĝin per fuelo de alia aviadilo, kaj la hoso trafis ĝian helicon. Tio malstabiligis ĝin kaj faligis ĝin. Usono insistas, ke la aviadilo mem ne havas ian malordon, sed nur pro malbona manipulado en ventoj la akcidento okazis.

Pri tiu akcidento kaj la maldeca eldiro de la komandanto la ĉefministro neniam postulis de li

pardonpeton, kaj simple diris, ke li postulis detalan esploron pri la akcidento. Sed surprize, nur post 6 tagoj Usono komencis flugigi *Osprey*-ojn, kaj la japana registaro esprimis komprenon pri tio, dirante, “Laŭ la informoj donitaj de Usono kaj esploroj faritaj de la ministerio de nacia defendo kaj la defendkorpuso, rekomenciĝo de la aviadiltrejnado estas akceptebla”. La guberniestro Onaga forte protestis kontraŭ Usono kaj la japana registaro, dirante, ke la timo pri *Osprey*-oj tute ne estas forviŝita kaj la japana registaro tute perdis sendependecon sub la milita pakto inter la du landoj.

Nun la registaro konstruas du novajn militbazojn por Usono en Okinavo: unu estas militbazo Henoko en la maro de la urbo Nago kaj la alia estas helikopter-alterigejoj de Takae. Se tiu militbazo Henoko estos konstruita, al ĝi povos veni 100 *Osprey*-oj kaj la plej modernaj militŝipoj, tiele Okinavo estos preskaŭ eterne militbazo de Usono. Se la helikopter-alterigejo estos konstruita, al ĝi flugos *Osprey*-oj, kies bruegoj ne permesos al la loĝantoj trankvilan vivon.

Por sukcesigi la konstruadojn, la registaro mobilizas 500 policanojn el la tuta Japanio kaj subpremas la kontraŭmovadon. Japanio estas ŝajne sendependa lando, sed en efektiveco kolonio de Usono. Japanio ne havas rajton mem esplori la usonajn akcidentojn, ne povas protesti kontraŭ Usono, neglektas plendojn de la loĝantoj, kiuj suferas/os pro danĝero kaj bruego de Osprey.

Tamen tiu movo de la registaro rilatas ne nur al Okinavo, sed al ĉiuj homoj en aliaj gubernioj, ĉar la

registaro jam mendis 5 *Osprey*-ojn por la japana defendkorpuso. En mia gubernio troviĝas militbazo de la defendkorpuso kaj oni planas fari trejnadon de *Osprey* tie, kaj nia urbestro aprobis tion.

La nuna registaro pli fortigas la militan ligon kun Usono. Por kunlabori kun ĝi, Japanio jam pretigis la leĝaron por tio. Kiam la nova prezidanto Trump postulos sendon de japanaj korpusanoj al militoj de Usono, ĉu Japanio povos rifuzi la postulon?